



Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

№ 7, Julio, 2007

## Esperanta pikniko - denove en Ŝikago!



Dimanĉe, la 24an de Junio post kelkjara interrompo estis renovigitaj niaj iam tradiciaj E-piknikoj. Partoprenintoj de la UK' 2005 en Vilno (Litovio) eble memoras, ke tie furoris novaĵo pri gefianĉiĝo de usonano Roberto kaj iranino Sepideh. Antaŭ unu jaro junparo geedziĝis kaj eĉ aĉetis domon (usona revo) en apuda vilaĝo Des Plains. Ĉi jare ĝia vasta korto, laŭ invito de gastemaj mastroj, fariĝis E-piknikejo. En posttagmezaj horoj la piknikon vizitis ĉ. 20 homoj, kaj ne nur E-istoj, sed ankaŭ iliaj familianoj kaj najbaroj (kio ebligis reklamon de IL kaj krokodiladon). La aranĝon ankaŭ vizitis hund-princino Fiona. Partoprenintoj ĝuis viandajn kaj vegetarajn rostaĵojn, kolbasetojn, bieron, vinon kaj fruktojn kun dolĉaĵojn, sonis E-muziko, regis amika etoso (vidu fotojn). Estis decidite pikniki venontjare kaj eĉ ni ricevis inviton por la sekvantjara aranĝo. Pri la ĝusta loko vi ekscios de la paĝoj de nia bulteno.

- Tute hazarde en Interreto estis trovita E-traduko de poemo "La korvo" de Edgar Allan POE. Faris ĝin membro de nia E-societo Jon WILLARSON, la traduko unue aperis en American Esperanto Magazine (julio-oktobro 1955). La fragmento estas publikigata de la afabla permeso de la tradukinto. Ĝuu la lingvon! (Redakcio)

## La Korvo

Foje malgajnoktomeze, dum la kapo pendis peze,  
Kaj mi legis volumegojn strangajn, plenajn de folklor',  
Dum mi lacis, dolorkapa, ekaŭdiĝis sono frapa,  
Kvazaŭ io frapet-frapa, frapis en la koridor'.

"Estas iu vizitanta ulo en la koridor'."

Diris mi kun eta plor'.

Ha, memoras mi kun vero, estis dum la neĝa tero,

Ĉiu disa flamegero brulis kiel ruĝa or'.



Longa nokto tedeginta – vane estis mi peninta  
Konsoliĝi legadinta – pro la pensoj pri Lenor',  
Pro la belulino kiun nomis anĝelar' Lenor' –  
Forvelkinta kiel flor'.

Kaj la silka susureto venadante de l' tapeto  
Min timigis per teruroj el la fundo de dolor'.  
Tial mi kun kor' batanta staris daŭre ridetanta,  
"Estas iu vizitanta ulo en la koridor' --

Iu ulo tre malfrua frapas en la koridor' –  
Tio nur, la timon for!"

Miaj pensoj tiam iĝis pli sentimaj kaj mi diris,

"Ja pardonu min mi petas Sinjorino aŭ Sinjor',

Sed en fakto mi dormetis, tiel milde vi frapetis,

Mi apenaŭ vin aŭdetis esti en la koridor'."

Kaj la pordon mi malfermis larĝe al la koridor' –

Jen mallumo, ĉio for.

En nigraĵon scivolante staris mi rigardegante,

Dube, pense, kaj revante aĵojn fremdajn al memor';

Sed silento preme estis, kaj malbruo daŭre restis,

Kvazaŭ kvietajoj festis per flustrita vort' "Lenor'!"

Tion flustris mi kaj eĥo remurmuris ĝin, "Lenor',"

En la fundo de la kor'...

### Lingva angulo

DEMANDO: Ĉu oni rajtas uzi la prepozicion JE en la senco "precize en tiu dato", kiel oni faras tion por horoj?

RESPONDO: Nenio malhelpas uzi la prepozicion JE por datoj, kvankam oni faras tion relative malofte; ekz.: "Mi venos je merkredo", "Mi venos je la 2-a de Februaro". Pli ofte oni uzas por datoj prepozicion kun konkreta signifo (ekz., "en"): "Mi venos en merkredo", "Mi venos en la 2-a de Februaro". Kaj eĉ pli ofte oni uzas por datoj la akuzativon: "Mi venos merkredon", "Mi venos la 2-an de Februaro". Resume: ĉiuj tri rimedoj por indiki daton estas permeseblaj. Mallongigitaj esprimoj kiel "je la tria" (sen eksplicita indiko, ĉu temas pri tago aŭ horo), tamen, kutime uziĝas nur pri horo ("je la tria" = "je la tria horo"). Tial oni evitu tian mallongigitan dirmanieron kun "je", se temas pri tago de monato.

### Adreso (provizora)

Esperanto Societo de Ŝikago  
p/a Viktor' Pajuk  
8228 O'Connor Dr., # 2F  
River Grove, IL 60171  
(773) 344-2276  
www.esperanto-chicago.org/

### Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk  
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong  
Eksprezidanto – Roberto Stalzer  
Sekretario – Gertrude Novak, MD  
Kasisto – Karlo Gunn

### MEMBROKOTIZO

Membro-subtenanto ; \$40 jare;  
Familia membro : \$30, Regula: \$20  
Studenta aŭ pensiula: \$10.

Gifts are welcome also.  
Dues are needed for the routine expenses  
of the Society.

Check should be payable to the Esperanto  
Society of Chicago, and mailed to our  
Treasurer,  
Charles Gunn, 828 S. Ada St,  
Chicago IL 60607

### KUNVENOJ

**okazas kutime la kvaran mardon  
de ĉiu monato  
en:**

**Sulzer Public Library, 4455 N.  
Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.**  
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda  
Konferenca Salono, unua etaĝo.

### Jen la informo pri niaj sekvantaj kunsidoj:

24an de Julio – K. Offutt kaj V. Pajuk informos pri la instrua Zagreba metodo,  
demonstrante E-filmon "Gerda malaperis"

28an de Aŭgusto – Roberto kaj Sepideh rakontos pri la lasta UK en Jokohamo

25an de Septembro – Tina Seastrom transdonos etoson de E-kurso en San-Diego

